# SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 11 REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT N-o 11

Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstrasse 22. Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12


## NIA LABORPROGRAMO

Akceptita dum la fakkunsido de l' 9-a SAT-Kongreso

### Celo

*1. Helpi per esperanto al la proleta liberpensa movado*

*Praktikaj taskoj:* Organizi "Liberpensulan Gazetservon", aperigi liberpensulajn paĝojn en laboristaj esp. gazetoj kaj ĵurnaloj kaj apartajn artikolojn, helpi al liberpensulaj proletaj organizoj, kolekti materialon por aranĝo de kontraŭreligiaj muzeoj k ekspozicioj k liveri al ili postulatajn informojn, aranĝi dum la kongresoj de SAT, LEA k UEA fakkunvenojn.

*2. Propagandi esperanton en liberpensaj organizoj*

*Praktikaj taskoj:* Disdoni varbfoliojn, aranĝi varbparoladojn, aranĝi kursojn, sendi reprezentantojn aŭ salutskribojn al la ĉefkunvenoj de la liberpensulaj organizoj k tie proponi poresp-ajn rezoluciojn.

*3. Batali kontraŭ religio per esperanto, kontraŭstarante peresp-an propagandon de religioj*

*Praktikaj taskoj:* Traduki gravajn verkojn en esperanton krei originalan proletan liberpensulan literaturon en esperanto k instigi la SAT-Eldonkooperativon eldoni ĝin.

### Membreco

Povas esti membro ĉiu proleta liberpensula SAT-ano deviganta sin aktive kunlabori en la Sekcio. Ĉiu membro pagas laŭplaĉan kotizon. La pagantaj sekcianoj ricevas senpage la bultenojn de la Liberpensula Gazetservo.

*Praktikaj taskoj:* Studi la agadon de religiaj organizoj k en siaj artikoloj senmaskigi ilian klasan burĝan esencon, malutilon de religio por la proletaro ktp. (Studi liberpensulan agadon en sia lando k informi pri liberpensula movado la gazetservon.) Por la sama celo kolekti taŭgan por liberpensula-ateista propagando materialon el religiaj k liberpensulaj prikulturaj, politikaj gazetoj k ĵurnaloj rilate al jenaj temoj: Ŝtato k Eklezio — Eklezio k Lernejo — Leĝaro pri eksiĝo el Eklezioj — Ŝtatsubvencio al Eklezio k sektanoj kompare kun tiu al popolsanigo, popolklerigo ktp. — Leĝoj pri edziĝo k eksedziĝo — Agado de Eklezio k Sektoj — Kremacio k kremaciejoj — Batalo eklezia k sekta kontraŭ proletaro — Statistiko prireligia — Statistiko pri liberpensula agado k movado — Formo k metodoj de la liberpensula movado k propagando — Milita danĝero — Faŝismo k religiaj organizoj — Religio k virinoj — Religio k junularo — Kongresoj religiaj k liberpensulaj. Sendi tradukita aŭ prilaborita en speciala artikolo supremenciitajn materialojn al Liberpensula Gazetservo (Traduki en nacian lingvon materialon de Liberpensula Gazetservo k Liberpensulaj Paĝoj aŭ speciale ricevitajn leterojn en esperanto, multobligi ilin k dissendi al liberpensulaj k laboristaj gazetoj). Kolekti bildojn, afiŝojn, flugfoliojn, laŭeble eĉ religiajn objektojn por kontraŭreligiaj ekspozicioj k muzeoj; precipe estas dezirindaj materialoj karakterizantaj aŭ ilustrantaj sukcesojn en la liberpensula movado (ekz. foton de likviditaj preĝejoj, en kiuj estas aranĝataj kulturejoj porproletaj, kremaciejoj, liberpensulaj orfejoj ktp.). (Plenumi la taskojn sub celo 3.) Registri ĉiujn sukcesojn de sia laboro k informi pri ili la Sekcion.

### Gvidado

La Sekcio estas gvidata de Komitato, kiu konsistas el sekretario-kasisto, redaktanto k la landreprezentantoj. La komitato estas elektata dum la fakkunveno de SAT-kongreso por unu jaro.

*Taskoj de la sekretario-kasisto:* Prizorgi laborplanon de la Komitato, interkonsiliĝi kun aliaj komitatanoj pri ĉiuj taskoj de la agado, interrilati je la nomo de la komitato kun diversaj organizoj ktp., aranĝi la fakkunvenon dum SAT-kongreso, kolekti kotizojn k eltrovi aliajn metodajn rimedojn por plifortikigi la kason de l' Sekcio k konservi ĉiujn dokumentojn certigantajn elspezojn de la kaso.

*Taskoj de la redaktanto:* Redakti Liberpensulajn Paĝojn k aperigi Liberpensulan Gazetservon; kontaktiĝi kun landaj liberpensulaj presorganoj, prepari eldonplanon de liberpensa literaturo.

*Taskoj de la landreprezentantoj:* Observi k helpi la agadon de la sekretario-kasisto k redaktanto, revizii la kason, gvidi la fakkunvenon dum SAT-kongreso, fondi k gvidi Liberpensulajn Sekciojn en LEA-organizoj, aranĝi fakkunvenon dum la LEA-kongresoj.

### Financoj

Financoj de la Sekcio konsistas el la laŭplaĉaj kotizoj de la sekcianoj k la kotizoj de la subtenantaj liberpensulaj organizoj.

### Fakkunveno

La fakkunveno de la SAT-kongreso estas prezidata de la ĉeestantaj komitatanoj. La tagordo devas enhavi: raportojn de la sekretario-kasisto k redaktanto k kasrevizio, baloton de la komitato. Dum la kunsido havas decidrajton la ĉeestantaj reprezentantoj de la subtenantaj liberpensulaj organizoj.

---

### Sekcianoj!

La Internacio de Proletaj Liberpensuloj demandas nin, ĉu ne estus ebla, fondi per la esperantistoj-liberpensuloj, proletajn liberpensulajn organizojn en jenaj landoj: Anglio, Hispanio, Holando, Sudameriko. Ni petas niajn sekcianojn en la nomitaj landoj, speciale niajn reprezentantojn, pripensi la aferon kaj tuj kun ni interrilati.

La gazetoj "Atheist" kaj "Der Gottlose" (Sendiulo), la unua nomita gazeto estas la organo de la IPF kaj la dua aperas en Germanio, nun ankaŭ portas la surpreson "Oni korespondas esperante".

La redaktanto deziras ricevi foton, bildon aŭ ilustritan karton pri la kremaciejo en via urbo kun sciindaj notoj; helpu kompletigi nian kolekton.

---

*Nia poŝto.* Individuaj skribaĵoj k liberpensaĵoj, nur estas prirespondataj respektive forsendataj se vi kunsendas internacian respondkuponon por la afranko. *1447.* Vian lastan skribaĵon mi sendis al Lublin al K-do 2798. *5508.* Mi jam ricevis la saman artikolon de K-do Bulba antaŭ kelkaj monatoj; kies traduko estas la pli bona?

---

*Liberpensuloj-esperantistoj de la tuta mondo,* sendu viajn adresojn al Centra Ateist-Esperantista Oficejo de USSR. Ĉiu adreso estos enpresita en Sovetiaj esp.-gazetoj senpage kaj rekomendita al sovetiaj ateistoj-esperantistoj. Sendu laŭ la adreso: Moskvo 26, Ĥavskij 11, kv. 137, N. Incertov (por Ateista Esperanto-Oficejo).

---

*D. Viktorov-Ĉeĥoviĉ,* USSR, Kiev, Klovski Spusk 2, sendas sovetaĵojn k ukrainajojn kontraŭ liberpensulaĵoj k esperantaĵoj. Nepre respondos.

---


**FABELOJ** de Hermynia Zur Mühlen

**Kion rakontas la amikoj de Peĉjo**

Lerte verkitaj sociaj rakontetoj en fabela formo, forte agitantaj por niaj socialistaj ideoj. Simpla lingvo k stilo garantias ĝuan legadon ankaŭ al komencantoj.

**Prezo 0,60 gmk. — 56 pĝ.**

**Administrejo de SAT,** R. Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig O 27.